Михаил Лермонтов,

# Anĝelo

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna animo
Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
Je revo mirinda pri Di' plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`.

Михаил Лермонтов,

# Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

*Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo* `http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html`. *Vidu ankau:* `http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm`.